

# Gramatiko de la ĉeĥa lingvo

Miroslav Malovec



K A V A - P E C H

Miroslav Malovec:

**Gramatiko de la ĉeĥa lingvo**

Eldonis: KAVA-PECH kiel sian 109-an eldonajon,  
la 51-an en Esperanto

Kovrilpaĝo: Luděk Neužil

Provlegis: Richard Howard

Presis: TYPOS, Tiskařské závody, a.s.  
2008, la 2-a eldono

Eldonejo: KAVA-PECH  
Anglická 878  
CZ-252 29 Dobřichovice  
<http://www.kava-pech.cz>

© Miroslav Malovec, 1995; la 2-a eldono 2008

**ISBN: 978-80-85853-98-5**

## Enhavo

Antaŭparolo .....	7
Pri la ĉeĥa lingvo .....	9
Alfabeto .....	11
Prononco .....	11
La artikolo .....	13
La gramatika genro .....	13
La deklinacio .....	14
La komparacio .....	15
La konjugacio .....	15
Substantivoj .....	18
Viraj .....	18
Inaj .....	19
Neŭtraj .....	20
Adjektivoj .....	21
Malmolaj .....	21
Molaj .....	22
Pronomoj .....	23
Verboj .....	24
A. Helpverbo „esti“ .....	24
B. Konjugacio de „aĉeti“ .....	25
C. Konjugaciaj klasoj .....	27

## Antaŭparolo

La gramatiko, kiun vi ĵus enmanigis, estas eldonita kiel kompletigo de Esperanta-ĉeĥa vortaro de la aŭtoroj Karel Kraft kaj Miroslav Malovec kaj de la vortaro Ĉeĥa-Esperanta de Karel Kraft. Kvankam ambaŭ vortaroj, ankaŭ eldonitaj de nia eldonejo, celas precipe la ĉeĥajn uzantojn, ili bone servas ankaŭ al eksterlandaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la ĉeĥa lingvo aŭ nur hazarde venis en kontakton kun ĝi. Por plifaciligi ilian laboron kun la vortaroj ni ilin kompletigis per paralela eldono de ĉi tiu konciza trarigardo de la ĉeĥa gramatiko. Kaj ĉar ĝi surprize elĉerpiĝis, nun ni alpaŝas al ĝia dua eldono.

Krom al la uzantoj de la supre menciitaj vortaroj ĝi certe bone utilos ankaŭ al la uzantoj de Baza ĉeĥa konversacio de la aŭtoroj Stanislava Chrdlová kaj Miroslav Malovec, do al tiuj, kiuj volos iom pli proksime konatiĝi kun iam enigme ŝanĝitaj ĉeĥaj vortoj en diversaj frazoj de tiu konversacia manlibro.

Ne nur el la supre skribitaj vortoj, sed ankaŭ el la eta amplekso de la „gramatiko“ vi certe ekkomprenas, ke la tasko de tiu ĉi manlibro ne estas vere instrui la ĉeĥan gramatikon, sed nur gustumigi ĝin kaj iom prezenti ĝian sistemon.

Atento estas donita al la klarigo de la prononco. Ja estas klare, ke ekzemple dum la demandoj pri la vojo aŭ similaj situacioj gravas, ke la lokuloj komprenu la nomon, kiun vi diras. Des pli, ĉar rilate la ĉeĥan tio simplas, pro regula elparolmaniero, simila al tiu de Esperanto.

Mi esperas, ke tiu ĉi libreto bone plenumos la intencatan taskon kaj bone servos al vi, karaj legantoj.

Petro Chrdle, eldonisto

## Pri la ĉeĥa lingvo

La ĉeĥa lingvo apartenas al la slava branĉo de la hindeŭropa lingva familio, nome al la okcident-slava grupo kune kun la lingvoj pola kaj slovaka. La ĉeĥa kaj slovaka estas reciproke kompreneblaj kvazaŭ dialektoj (ili apartiĝis en la mezo de la 19-a jarcento), kvankam ili diferencas ankaŭ fonetike (en la slovaka mankas „ř“, la ĉeĥa ne posedas „ä, ô, í, ř, ľ“).

La malnova ĉeĥa literaturo floris inter la 14-a kaj 17-a jarcentoj, sed precipe la protestantisma, tial la rekatoliga periodo (post la batalo apud Prago en 1620, en kiu venkis la katolikoj) persekutis la malnovajn verkojn kaj bremsis la lingvan evoluon. Nur post la patento de la imperiestro Jozefo la II-a pri religia toleremo (1781) eblis reeldoni la klasikajojn, kaj la nacia renesanco povis starti. Kiel bazon por la moderna ĉeĥa lingvo oni elektis la klasikan tradukon de Biblio el la 16-a jarcento – tiel estiĝis konsiderinda diferenco inter la normigita lingvo literatura kaj spontana lingvo parola.

La ĉeĥa estas lingvo fleksia, posedanta 7 deklinaciajn kazojn. Por deklinaciado kaj konjugaciado ekzistas multaj paradigmoj kaj esceptoj, tial la ĉeĥa estas relative tre malfacila. Danke al diversaj kazoj ĝi ne havas firme ligitan vortordon, kies ŝanĝado povas reliefigi aŭ malemfazi frazelementojn laŭ bezono aŭ deziro de la parolanto.

Ne lasu vin fortimigi kaj legu plu!

## Alfabeto:

a á b c ĉ d ĉ' e é ě f g h ch i í j k l m n ŝ o ó p r ř s ŝ t ť u ú ů v w x  
y ý z ž

## Prononco:

- a) **á é í ó ú ů ý** vokaloj prononcataj pli longe ol la samaj vokaloj sen supersigno (streketo, cirkleto). La supersigno ne signas akcenton, kiu estas ĉiam sur la unua silabo, dum longaj povas esti ankaŭ silaboj senakcentaj. Longeco diferencigas signifon de vortoj (*dráha* fervojo, *drahá* kara, multekosta; *muže* viron, *může* povas). **y, ý** estas elparolataj same kiel **i, í** (la plej ofta ortografia stumbligilo de ĉeĥaj infanoj): *být* esti, *bít* bati; **ů** (deveninta de *uo*) estas prononcata same longe kiel **ú**: *útok* atako, *dolů* malsupren (**ú** estas uzata komence de vortoj, en derivaĵoj de tiaj vortoj kaj en fremddevenaj vortoj: *zaútočit* ekataki, *difúze* difuzo). En la ĉeĥa oftas la diftongo **ou** = oŭ, en fremdvortoj ankaŭ **au** = aŭ: *mouka* faruno; *jedou* ili veturas; *auto* aŭto(mobilo); *pauza* paŭzo. Silaboformaj konsonantoj **r, l** povas krei silabojn ŝajne sen vokaloj (en la realo ili funkcias kiel veraj vokaloj, kun kiuj ili havas tre similan artikulacion): *krk* kolo, *vlk* lupo, *mlha* [du silaboj: ml-ha] nebulo, *brzo* [br-zo] baldaŭ.
- b) **č** = ĉ; **ch** = ĥ; **š** = ŝ; **ž** = ĵ; **x** = ks, kz; **ř** = rŝ, rĵ (kiel unu sono): *čokoláda* ĉokolado; *chameleon* ĥameleono; *šakal* ŝakalo; *žurnál* ĵurnalo: *experiment* eksperimento; *exekuce* ekzekuto, ekzekucio; *kalendář* [kalendárŝ] kalendaro; *řeka* [rĵeka] rivero. Al la voĉaj konsonantoj **b d g h v z ž** apartenas ankaŭ voĉa prononco de **x** [kz] kaj de **ř** [rĵ], al la senvoĉaj konsonantoj **p t k ch f s ŝ** apartenas ankaŭ senvoĉa prononco

de **x** [ks] kaj de **ř** [rř]. Fine de silaboj eĉ voĉaj konsonantoj estas prononcataj senvoĉe: *hrob* [hrop] tombo, *hrad* [hrat] burgo, *kruh* [kruĥ] cirklo, *keř* [kerř] arbedo. Okazas ankaŭ asimiliĝo kun sekva konsonanto: *podchod* [pothot] subpasejo; *kdo* [gdo] kiu; *vĉera* [fĉera] hieraŭ ktp.

- c) **ď** **ť** **ň** estas *molaj* konsonantoj prononcataj proksimume kiel dj, tj, nj, sed ĉiam temas pri unu sono (kiel ĉe la hispana *ñ* en *España* aŭ franca *gn* en *cognac*, *d'Artagnan*); dum ĉe la malmolaj konsonantoj *d*, *t*, *n* la langopinto nur ektuŝas la suprajn dentojn, ĉe *ď*, *ť*, *ň* ĝi premiĝas al la dentoj pli forte: *kád'* kuvo, *lat'* lato, *laň* cervino, *ňadra* mamoj, brusto, *d'ábel* diablo, *ťukat* frapeti. La moliga signo (˘) ne estas uzata, se sekvas la vokalo **i**, kiu moligas aŭtomate: **di**, **ti**, **ni** legu *d'i*, *t'i*, *ni*, diference de **dy**, **ty**, **ny**, kiujn oni prononcas sen moligo. Simile se sekvas la vokalo **ě**, ĝi transprenas la moligan signon: **dě**, **tě**, **ně** prononcu *d'e*, *t'e*, *ne*. La silabon **mě** oni elparolas *mĉe*: *v domě* [v domĉe] en la domo, *měsíc* [mĉesíc] monato. La ortografio malgraŭ la sama prononco povas distingi diferencajn signifojn: *mě* [mĉe] min (de mi, pri mi), *mně* [mĉe] al mi. La vokalo **ě** estas uzata ankaŭ en la silaboj **bě** **pě** **vě** prononcataj *bje pje vje*: *běhat* [bjehat] kuradi, *opět* [opjet] denove, *věk* [vjek] aĝo. Ankaŭ ili povas distingi signifojn: *oběd* [objet] tagmanĝo, *objet* [objet] ĉirkaŭveturi, *vědu* [vjedu] sciencon, *vjedu* [vjedu] mi enveturos.

- d) La **akcento** estas ĉiam sur la unua silabo, ne grave, ĉu la silabo estas longa aŭ mallonga. Longaj povas esti eĉ senakcentaj silaboj: *kamarád* kamarado, amiko. Prepozicio kunfandiĝas kun la sekvanta substantivo en unu prononcan blokon kaj tial ĝi transprenas la akcenton: *se mnou* [legu: semnou] kun mi; *na stole* [**n**astole] sur la tablo.



## La artikolo

En la ĉeĥa ekzistas nek la difina, nek la nedifina artikolo, la substantivoj estas uzataj sen artikoloj. Nur se oni volas emfazi difinecon aŭ nedifinecon, oni uzas pronomojn montrajn aŭ nedifinajn. Eblas do triopo: viro – tiu viro – iu viro.

## La gramatika genro

La substantivoj povas esti de genro **vira**, **ina** aŭ **neŭtra**. Bedaŭrinde la genro ne estas natura, do ankaŭ plantoj kaj objektoj povas aparteni al la genroj vira aŭ ina, ne nur al la neŭtra. La neŭtran genron posedas eĉ kelkaj nomoj de personoj (*dítě* infano, *děvče* knabino, *páže* paĝio). La bestonomoj kiel zoologiaj specioj (sen indiko de sekso) povas aparteni al ajna genro: *pes* hundo (vira), *kočka* kato (ina), *prase* porko (neŭtra). Sed: *fena* hundino (ina), *kocour* virkato (vira), *kanec* virporko (vira), *svině* porkino (ina).

Koncernan genrecon ofte malkaŝas finaĵo aŭ sufikso, kvankam ne ĉiam. La genro aperas ankaŭ ĉe adjektivoj, adjektivaj pronomoj, adjektivaj numeraloj kaj adjektivaj verboj (= participoj). La ĉeĥa preterito historie evoluis el participo, tial ankaŭ ĉe ĝi estas distingata la genro (kaj la nombro: singularo aŭ pluralo). Ĉeĥa virino parolas pri si mem diference ol viro: *mi estis feliĉa* byl jsem šťastný (viro), *byla* jsem šťastná (virino). Tial ĉe ĉeĥlingvaj romanoj, rakontataj en la unua persono, oni tuj vidas, ĉu la rakontanto estas viro aŭ virino.

## La deklinacio

La ĉeĥa kiel fleksia lingvo posedas 7 deklinaciajn kazojn:

1. *nominativ* (žena virino)
2. *genitiv* (ženy de virino)
3. *dativ* (ženě al virino)
4. *akuzutiv* (ženu virinon)
5. *vokativ* (ženo! virino!)
6. *lokál* (ženě pri virino)
7. *instrumentál* (ženou per virino)

La nomoj de la kazoj esprimas nur ilian bazan funkcion, sed lige kun diversaj prepozicioj ili povas ricevi multajn aliajn signifojn. Unu prepozicio povas havi eĉ plurajn signifojn lige kun diversaj kazoj (*o hlavě* pri la kapo, *o hlavu vyšší* je kapo pli alta).

La substantivoj havas kvar deklinaciajn paradigmojn por la vira genro (*muž* viro, *pán* sinjoro, *hrad* kastelo, *stroj* maŝino), kvar por la ina (*žena* virino, *růže* rozo, *píseň* kanto, *kost* ostoj) kaj kvar por la neŭtra (*město* urbo, *kuře* kokido, *moře* maro, *stavení* konstruaĵo).

La adjektivoj ekzistas **malmolaj** kun finaĵoj **-ý** por la vira genro, **-á** por la ina kaj **-é** por la neŭtra (*mladý, mladá, mladé* juna), **molaj** kun finaĵo **-í** por ĉiuj tri genroj (*jarní* printempa) kaj **posedaj**, deriveblaj sole el substantivoj de viraj kaj inaj personoj (*otcův* patra, de la patro; *matčín* patrina, de la patrino).

Personaj pronomoj havas ĉiu propran deklinacion (ne ekzistas komuna paradigmo), iuj pronomoj estas deklinaciaj kiel adjektivoj.

Bazaj numeraloj havas simpligitan deklinacion. Ekde la numeralo kvin la nombrataj substantivoj havas genitivan pluralan formon: *čtyři chlapci* kvar knaboj; *pět chlapců* kvin knaboj (laŭvorte: kvin da knaboj), *sto chlapců* cent knaboj (cent da knaboj).

## La komparacio

La komparativo de adjektivoj formiĝas per la sufikso **-ŝí** kaj la superlativo ankoraŭ akceptas prefikson **nej-**:

1. *mladý* juna
2. *mladší* pli juna
3. *nejmladší* la plej juna

La komparativo kaj superlativo estas komunaj por ĉiuj tri genroj, ĉar la sufikso **-ŝí** apartenas al la mola deklinacio.

La adverboj deriviĝas el adjektivoj per finaĵo **-e** (aŭ **-ě**), ilia komparativo per sufikso **-eji** kaj la superlativo ankaŭ akceptas prefikson **nej-**:

1. *mladě* june
2. *mlaději* pli june
3. *nejmlaději* plej june

## La konjugacio

Por la slavaj verbaj sistemoj estas tipa aspektisma karaktero kaj tiel nomataj aspekto-duopoj. Preskaŭ por ĉiu verba signifo ekzistas du verboj, el kiuj unu esprimas la agon en ĝia daŭro (aspekto de daŭro), la alia la saman agon en ĝia rezulto (aspekto de rezulto). Ekz. *psát/napsat* skribi, *brát/vzít* preni, *kupovat/koupit* aĉeti, *dělat/udělat* fari, *telefonovat/zatelefonovat* telefoni ktp. La verbo de daŭro ne diras, ĉu la ago estas sukcese kaj komplete finita aŭ ne, la verbo de rezulto male emfazas ĝuste la sukcesan kaj kompletan finiĝon de la ago. Ekzemple *skribi leteron* eblas traduki kiel *psát*

*dopis* (esti skribanta leteron) aŭ kiel *napsat dopis* (esti skribinta leteron komplete). Laŭ la ĉeĥa terminologio la verboj de daŭro estas nomataj *nedokonová slovesa* (nefinverboj, neperfektivaj verboj), la verboj de rezulto *dokonová slovesa* (finverboj, perfektivaj verboj), sed en Esperanto eble pli konvenus la terminoj *imperfektaj verboj* kaj *perfektaj verboj*.

Sole la verboj de daŭro havas ĉiujn tri tempojn (preterita, prezenca, futura), dum la verboj de rezulto ne havas la prezencon, ĉar kio ĝuste nun okazas, tio ankoraŭ ne havas rezulton. Komplete ambaŭ verboj donas kvin tempojn: imperfektan preteriton, perfektan preteriton, imperfektan prezencon, imperfektan futuron kaj perfektan futuron.

La sistemon riĉigas ankoraŭ prefiksoj kaj sufiksoj: *psávat* skribadi, ofte skribi; *psávávat* tre ofte skribadi; *dopsat* finskribi; *dopisovat* finskribadi; *dopisovávat* tre ofte finskribadi ktp.

La ĉeĥaj **infinitivoj** finiĝas per **-t** (*koupit* aĉeti), escepte per **-ci** (*péci* baki). Ĉe konjugaciado ekzistas por ĉiu persono aparta formo, tial preskaŭ ne estas uzataj personaj pronomoj: *jsem* mi estas, *jsi* vi (ci) estas, *je* li/ŝi/ĝi estas, *j sme* ni estas, *j ste* vi estas, *jsou* ili estas.

La **prezencaj** formoj estas simplaj, ne kunmetitaj (*píšu* mi skribas), sed ekzistas 5 klasoj de konjugaciado.

La **preterito** havas formon kompleksan, kiu konsistas el prezenco de la neregula helpverbo *být* (esti) kaj el tiel nomata preterita participo, kiu havas formojn viran (*psal* li skribis), inan (*psala* ŝi skribis), neŭtran (*psalo* ĝi skribis) kaj pluralajn (*psali* viroj skribis, *psaly* inoj skribis, *psala* neŭtroj skribis). Ekz. *psal jsem* mi estis skribanta (daŭro), *napsal jsem* mi estas skribinta (rezulto).

La **futuro** de perfektivaj verboj de rezulto havas formojn simplajn, fakte prezencajn en funkcio de futuro (*napišu* mi komplete skribos). La futuro de neperfektivaj verboj de daŭro havas formojn kompleksajn, konsistantajn el futuro de la neregula helpverbo *být*

(esti) kaj el infinitivo de la ĉefa verbo (*budu psát* mi skribos, mi estos skribanta).

La **kondicionalo** konsistas el la preterita participo kaj kondicionala formo de la helpverbo *být* (*psal bych* mi estus skribanta, *napsal bych* mi estus skribinta).

La **volitivo** estas uzata ĉe dua persono de ambaŭ nombroj kaj ĉe la unua persono plurala: *piš!* (ci) skribu! *pišme!* ni skribu! *pište!* (vi) skribu! *napiš!* *napište!* skribu (ĝisfine)! *napišme!* ni skribu (ĝisfine)! Ĉe aliaj personoj la ordono aŭ deziro estas esprimata per adverbo *at'* kun la prezenco: *at' pišu* mi skribu, *at' napišou* ili skribu (ĝisfine).

La **participoj aktivaj** estas praktike uzataj nur de verboj neperfektivaj kaj sole antaŭ substantivoj (*pišící chlapec* skribanta knabo). La aktivaj participoj perfektaj (diferencaj de la preteritaj!) aperas nur en malnova literaturo kaj nun estas taksataj kiel arkaikaj (*napsavší chlapec* skribinta knabo). En kompleksaj verbaj formoj kun la helpverbo *být* oni uzas la **pasivajn participojn**. De la neperfektivaj verboj formiĝas la tiel nomataj *estantaj pasivaj participoj*, de la verboj perfektivaj la *estintaj pasivaj participoj*. Ekzemploj: *dopis byl psán* la letero estis skribata, *dopis byl napsán* la letero estis skribita.

La **gerundioj** ekzistas, sed konsiderate arkaikaj, ili praktike ne estas uzataj. Ili havas tri formojn: viran, komunan inan kaj neŭtran, komunan pluralan (*piše, pišíc, pišíce* skribante; *napsav, napsavší, napsavše* skribinte).

La **negativon** kreas la prefikso **ne-**: *nejsem* mi ne estas, *nepišu* mi ne skribas, *nepiš!* ne skribu! En ĉeĥa frazo ĉiuj negeblaj vortoj havas negacian formon: **nikdy nikomu nic neřeknu** neniam mi ion diros al iu (laŭvorte: **neniam al neniun nenion mi ne diros**). Ĉe du verboj du negacioj rezultigas pozitivon: **nemohu nepřijít** mi ne povas ne veni (= mi devas veni).

# SUBSTANTIVOJ

## Viraj

viro

sinjoro

maŝino

kastelo

---

## Singularo

1. muž	pán	stroj	hrad
2. muže	pána	stroje	hradu
3. muži, mužovi	pánu, pánovi	stroji	hradu
4. muže	pána	stroj	hrad
5. muži!	pane!	stroji!	hrade!
6. muži, mužovi	pánu, pánovi	stroji	hradě
7. mužem	pánem	strojem	hradem

## Pluralo

1. muži, mužové	páni, pánové	stroje	hrady
2. mužů	pánů	strojů	hradů
3. mužům	pánům	strojům	hradům
4. muže	pány	stroje	hrady
5. muži! mužové!	páni! pánové!	stroje!	hrady!
6. mužích	pánech	strojích	hradech
7. muži	pány	stroji	hrady

## Inaj

virino

rozo

kanto

osto

---

### Singularo

1. žena	růže	píseň	kost
2. ženy	růže	písně	kosti
3. ženě	růži	písní	kosti
4. ženu	růži	píseň	kost
5. ženo!	růže!	písní!	kosti!
6. ženě	růži	písní	kosti
7. ženou	růží	písní	kostí

### Pluralo

1. ženy	růže	písně	kosti
2. žen	růží	písní	kostí
3. ženám	růžím	písním	kostem
4. ženy	růže	písně	kosti
5. ženy!	růže!	písně!	kosti!
6. ženách	růžích	písních	kostech
7. ženami	růžemi	písněmi	kostmi

## Neŭtraĵ

urbo

maro

kokido

konstruaĵo

---

### Singularo

1. město	moře	kuře	stavení
2. města	moře	kuřete	stavení
3. městu	moři	kuřeti	stavení
4. město	moře	kuře	stavení
5. město!	moře!	kuře!	stavení!
6. městě	moři	kuřeti	stavení
7. městem	mořem	kuřetem	stavením

### Pluralo

1. města	moře	kuřata	stavení
2. měst	moři	kuřat	stavení
3. městům	mořích	kuřatům	stavením
4. města	moře	kuřata	stavení
5. města!	moře!	kuřata!	stavení!
6. městech	mořích	kuřatech	staveních
7. městy	moři	kuřaty	staveními



# ADJEKTIVOJ

## Malmolaj

juna (li)

juna (ŝi)

juna (ĝi)

---

### Singularo

1. mladý	mladá	mladé
2. mladého	mladé	mladého
3. mladému	mladé	mladému
4. mladého	mladou	mladé
5. mladý!	mladá!	mladé!
6. mladém	mladé	mladém
7. mladým	mladou	mladým

### Pluralo

1. mladí	mladé	mladá
2. mladých	mladých	mladých
3. mladým	mladým	mladým
4. mladé	mladé	mladá
5. mladí!	mladé!	mladá!
6. mladých	mladých	mladých
7. mladými	mladými	mladými

## Molaj

printempa (li)

printempa (ŝi)

printempa (ĝi)

---

### Singularo

1. jarní	jarní	jarní
2. jarního	jarní	jarního
3. jarnímu	jarní	jarnímu
4. jarního	jarní	jarní
5. jarní!	jarní!	jarní!
6. jarním	jarní	jarním
7. jarním	jarní	jarním

### Pluralo

1. jarní	jarní	jarní
2. jarních	jarních	jarních
3. jarním	jarním	jarním
4. jarní	jarní	jarní
5. jarní!	jarní!	jarní!
6. jarních	jarních	jarních
7. jarními	jarními	jarními

# PRONOMOJ

## Singularo

<b>mi</b>	<b>ci</b>	<b>li</b>	<b>ŝi</b>	<b>ĝi</b>
1. já	ty	on	ona	ono
2. mě, mne	tebe	jeho, ho	jí	jeho, ho
3. mně, mi	tobě, ti	jemu, mu	jí	jemu, mu
4. mě, mne	tebe, tě	jeho, ho	ji	je, ho
5. –	ty!	–	–	–
6. mně	tobě	něm	ní	něm
7. mnou	tebou	jím	jí	jím

## Pluralo

<b>ni</b>	<b>vi</b>	<b>ili</b> (viroj)	<b>ili</b> (inoj)	<b>ili</b> (neŭtroj)
1. my	vy	oni	ony	ona
2. nás	vás	jich	jich	jich
3. nám	vám	jim	jim	jim
4. nás	vás	je	je	je
5. –	vy!	–	–	–
6. nás	vás	nich	nich	nich
7. námi	vámi	jimi	jimi	jimi

## Rimarkigo:

Ĉe la tria persono de ambaŭ nombroj la komenca **j-** ŝanĝiĝas post prepozicioj al **ň-** (skribate *ně-, ni-, ní-*), ekz. *do něho* en lin, en ĝin, *k nim* al ili, *s ní* kun ŝi k.s. La 6-a kazo estas uzata ĉiam kun iu prepozicio.

# VERBOJ

## A. Helpverbo

### Infinitivo

**být** esti

### Prezenco

1. <b>jsem</b>	mi estas	<b>jsme</b>	ni estas
2. <b>jsi</b>	vi (ci) estas	<b>jste</b>	vi estas
3. <b>je</b>	li (ši, ĝi) estas	<b>jsou</b>	ili estas

### Preterito

1. <b>byl jsem</b>	mi estis	<b>byli jsme</b>	ni estis
2. <b>byl jsi</b>	vi estis	<b>byli jste</b>	vi estis
3. <b>byl</b>	li estis	<b>byli</b>	ili estis

### Futuro

1. <b>budu</b>	mi estos	<b>budeme</b>	ni estos
2. <b>budeš</b>	vi estos	<b>budete</b>	vi estos
3. <b>bude</b>	li estos	<b>budou</b>	ili estos

### Kondicionalo

1. <b>byl bych</b>	mi estus	<b>byli bychom</b>	ni estus
2. <b>byl bys</b>	vi estus	<b>byli byste</b>	vi estus
3. <b>byl by</b>	li estus	<b>byli by</b>	ili estus

### Volitivo

1. –		<b>bud' me</b>	ni estu
2. <b>bud'</b>	estu (ci)	<b>bud'te</b>	estu (vi)
3. –		–	

## B. Konjugacio de „aĉeti“:

### Infinitivoj

neperfektiva:	<b>kupovat</b>	aĉeti (esti aĉetanta, provi aĉeti)
perfektiva:	<b>koupit</b>	aĉeti (esti aĉetinta, havi aĉetite)

### Prezenco (neperfektiva)

1. <b>kupuji</b>	mi aĉetas	<b>kupujeme</b>	ni aĉetas
2. <b>kupuješ</b>	vi aĉetas	<b>kupujete</b>	vi aĉetas
3. <b>kupuje</b>	li aĉetas (ŝi, ĝi)	<b>kupují</b>	ili aĉetas

### Preterito neperfektiva (estis aĉetanta)

1. <b>kupoval jsem</b>	<b>kupovali jsme</b>
2. <b>kupoval jsi</b>	<b>kupovali jste</b>
3. <b>kupoval</b>	<b>kupovali</b>

### Preterito perfektiva (rezulte aĉetis, estas aĉetinta)

1. <b>koupil jsem</b>	<b>koupili jsme</b>
2. <b>koupil jsi</b>	<b>koupili jste</b>
3. <b>koupil</b>	<b>koupili</b>

### Futuro neperfektiva (estus aĉetanta)

1. <b>budu kupovat</b>	<b>budeme kupovat</b>
2. <b>budeš kupovat</b>	<b>budete kupovat</b>
3. <b>bude kupovat</b>	<b>budou kupovat</b>

### Futuro perfektiva (rezulte aĉetos, estos aĉetinta)

1. <b>koupím</b>	<b>koupíme</b>
2. <b>koupíš</b>	<b>koupíte</b>
3. <b>koupí</b>	<b>koupí</b>

Kondicionalo neperfektiva (estus aĉetanta)

- |                        |                        |
|------------------------|------------------------|
| 1. <b>kupoval bych</b> | <b>kupovali bychom</b> |
| 2. <b>kupoval bys</b>  | <b>kupovali byste</b>  |
| 3. <b>kupoval by</b>   | <b>kupovali by</b>     |

Kondicionalo perfektiva (rezulte aĉetus)

- |                       |                       |
|-----------------------|-----------------------|
| 1. <b>koupil bych</b> | <b>koupili bychom</b> |
| 2. <b>koupil bys</b>  | <b>koupili byste</b>  |
| 3. <b>koupil by</b>   | <b>koupili by</b>     |

Volitivo neperfektiva (aĉetu, estu aĉetanta)

- |                       |                      |
|-----------------------|----------------------|
| 1. –                  | <b>kupujme! (ni)</b> |
| 2. <b>kupuj! (ci)</b> | <b>kupujte! (vi)</b> |
| 3. –                  | –                    |

Volitivo perfektiva (rezulte aĉetu)

- |                     |                    |
|---------------------|--------------------|
| 1. –                | <b>kupme! (ni)</b> |
| 2. <b>kup! (ci)</b> | <b>kupte! (vi)</b> |
| 3. –                | –                  |

Participo

<b>kupující</b>	aĉetanta	<b>kupovaný</b>	aĉetata
<b>koupivší</b>	aĉetinta	<b>koupený</b>	aĉetita

## C. Konjugaciaj klasoj

La kvin konjugaciaj klasoj diferencas precipe per finaĵoj en prezenco (aŭ perfekta futuro, kiu estas prezenco en futura funkcio).

I	II	III	IV	V
porti	premi	kovri	planti	fari

---

### Singularo

1. nesu	tisknu	kryji	sázim	dělám
2. neseš	tiskneš	kryješ	sázíš	děláš
3. nese	tiskne	kryje	sází	dělá

### Pluralo

1. neseme	tiskneme	kryjeme	sázíme	děláme
2. nesete	tisknete	kryjete	sázíte	děláte
3. nesou	tisknou	kryjí	sázejí	dělají